stis aldonante tekston kun 1303 vortoformoj kaj elnombris 124 novajn vortoformojn, dum oni povis atendi 140. Samtempe montriĝis, ke la teksto enhavis 60 novajn vokablojn, dum teorie atendeblaj estis 67. La rilatimo 60:124 estas tamen preskaŭ precize 67:140.

Por la Esperanto-tekstaro de 25.500 vortoformoj ni konstatis vortaran amplekson de 4746 vortoformoj respektive 2800 vokabloj. El tiuj donitaĵoj sekvis

$$\lg V_o = 6,65 \quad \text{(vortoformoj)}$$
$$\lg V_o = 5,55 \quad \text{(vokabloj)}$$

La diferenco kompreneble ŝuldiĝas al tio, ke el ĉiu vakablo oni povas formi regule plurajn vortoformojn. La diferenco inter ambau $\lg V_o$, kiu estas 1,10, estas komprenebla, se oni supozas, ke ĉiu vokablo povas liveri $10^{1,1} = 12,6$ vortoformojn meze. Se oni konsideras, ke speciale el verba radiko estas formeblaj tiom da participoj kun diversaj gramatikaj finaĵoj, tiu faktoro ne ŝajnas troigita. Utiligante la statistikon de V. Sadler [15] oni povas taksi, ke ĉiu vokablo estas pluformebla al ĉ. 9 vortoformoj.

Ĉar la prezentita materialo bone akordiĝas kun la eldiroj ĉerpeblaj el nia hipoteza diferenciala ekvacio, ni povas esti certaj, ke la derivitaj formuloj estas universale aplikeblaj kaj kontentige respegulas la statistikajn leĝojn inter la ampleksoj de taksto kaj vortaro.

BIBLIOGRAFIAJ NOTOJ

[1] Charles Muller, Initiation à la statistique linguistuque. Paris 1968.
[2] G. Herdan, Language as Choice and Chance. Groningen 1956.
[3] W. Muller, Gedanken zur automatischen Analyse von Normen und Normabweichungen. En: Muttersprache, kajero 9/10, 1969.
[4] Kaeding, Häufigkeitswörterbuch der deutschen Sprache. Steglitz bei Berlin, 1898.
[5] H. Meier, Deutsche Sprachstatistik. Hildesheim 1964.
[6] E. Steinfeldt, Russian Word Count, Moscow (sen jaro).
[7] G. K. Zipf, The Psycho-Biology of Language. Cambridge (USA) 1965.
[8] W. Klein, H. Zimmermann, Trakl. Versuche zur maschinellen Analyse von Dichtersprache. En: Sprachkunst, kajero 1/2, 1970.
[9] Josef Mistrik, Quantitative Methods and Stylistic Typology. En: Recueil linguistique de Bratislava, Volume II, Bratislava 1968.
[10] I. Lapenna, La internacia lingvo kiel esprimo kaj antaŭeniganto de universalismaj tendencoj. En: I. Lapenna, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Rotterdam 1966.
[11] I. Lapenna, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Rotterdam 1966.
[12] L.L. Zamenhof, Originala Verkaro. Leipzig 1929.
[13] Ch. Muller, Essai de statistique lexicale, Paris 1964.
[14] Ch. Muller, Etude de statistique lexicale, Paris 1967.
[15] V. Sadler, Relativaj oftecoj de kelkaj lingvaj elementoj en Esperanto. En Scienca Revuo, kajero 2/3, 1959.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.

LA LINGVONIMIKO

- ĝiaj esenco kaj problemoj -

/A.D.Duličenko, AŜHABAD, Sovetio/

En la lingvistika scienco de la lasta periodo intensive evoluiĝas iuj novaj branĉoj, al kiuj apartenas ankaŭ onomastiko. La amasigo kaj la plenigo de materialo pri la nomita temaro postulis diferenciĝon kaj apartiĝon de kelkaj mallarĝaj onomastikaj branĉoj. Tiel, el la toponimiko apartiĝis hidronimiko, urbonimiko /aŭ polisonimiko/ ktp., el la antroponimiko - etnonimiko.

En la artikolo estas entreprenita unu provo pli diferencigi etnonimian materialon, apartiginte novan branĉon /aspekton/ pri nomoj de lingvoj de la mondo. Bone estas konate, ke lingvo estas unu el la plej gravaj signoj de nacio aŭ popolo. Pro tio ni konsideras la materialon pri nomoj de lingvoj kiel sendependa branĉo /aspekto/ de la etnonimiko[1/].

La nuntempa mondo parolas proksimume 2500 - 3000 lingvojn. La kompleteco de lingva karto estas kondiĉita /krom iuj aliaj kaŭzoj/ de la malkontenta esploreco de apartaj lingvogrupoj; ofte pro tio estas embarase diferencigi unu dialekton aŭ subdialekton de lingvo mem. En la historio de esploro de la lingvoj en Afriko kaj en Azio estas konataj eventoj, kiam esploristoj nomigis unu priskribatan lingvon, baziĝante a/ sur la nomo de tribo aŭ gento /t.e. sur la bazo de etnonimo/, b/ sur la nomo de loko, c/ sur la nomo, kiu uzis najbaraj triboj rilate al alia tribo, d/ sur la nomo de unu el kelkaj dialektoj de la sama lingvo ktp. Pro tio lingvistika karto de la mondo suferas de defektoj kaj de konfuzaĵo. Pro tio ni konstatas, ke nuntempe la homoj de nia terglobo parolas ĉirkaŭ 2500-3000 lingvojn.

1/ Ni agnoskas ankaŭ koheron de nomoj de la lingvoj kun lingvistika terminaro, sed en la artikolo, pro la manko de loko, ni aparte la problemon ne pritraktas.

Baziĝante sur la antaŭe dirita, ni konsideras, ke por la antroponimiko kaj por la onomastiko ĝenerale la apartigo de unu aspekto /la nomoj de lingvoj/ el la etnonimiko estas havi senduban teorian kaj praktikan utilon. Laŭ nia opinio, por la nomoj de lingvoj estas pli konvena hibrida termino l i n g v o n i m i k o /latina "lingua" kaj greka "onoma"/ - laŭ la analogio kun aliaj lingvistikaj terminoj /urbonimiko, lingvogeografio ktp./. Tiamaniere, la l i n g v o n i m i k o estas unu etnonimika branĉo pri la nomoj de lingvoj kaj ĝiaj strukturoj, variantoj ktp. La tuteco de lingvonimoj /lingvonimia materialo/ ni markas kiel l i n g v o n i m i o. La l i n g v o n i m o estas konkreta nomo de unu lingvo /kun ĝiaj variantoj/ aŭ lingva variaĵo, ekz. en la rusa: tureckij jazyk /turka lingvo/; en la germana: Türkisch; en la ĉeĥa: turečtina; en la turka: türk dili ktp. La tuteco de lingvonimoj en unu konkreta lingvo ni nomigu ekz. Esperanta lingvonimio, rusa lingvonimio, japana lingvonimio k.a.

Nun ni analizu iujn konkretajn problemojn de la lingvonimiko [2/]. Antaŭ ĉio ni konsideru rilaton inter

l i n g v o n i m o k a j e t n o n i m o.

Inter la nomitaj elementoj ekzistas malvasta kohero, esprimanta en tiu fakto, ke

1.- Plimulto da lingvonimoj formiĝas sur la bazo de etnonimoj. Pro tio la lingvonimo kaj la etnonimo koincidas, sed primara estas etnonimo. Jen kelkaj ekzemploj de la koincido de tiuj elementoj: En la rusa lingvo: ital'janskij jazyk - ital'janec /itala lingvo-italo/; en la ĉeĥa: japoština - Japonec /japana l. - japanano/; en la germana: Deutsch - Deutsche /germana l. - german/an/o/ k.a.

2.- Oftokaze lingvonimo kun etnonimo ne koincidas. Tiuj okazoj estas por la lingvonimiko pli interesaj el teoria kaj el praktika vidpunktoj. En tiu rilato estas interesa eldiro, disvastigita inter taĝikoj de valo Pjanĝŝer en la sudo de Hindukuŝ: "lafz-i mo porsiwon, xedemo-tojik" /"nia lingvo estas farsi /persa/, sed ni estas taĝikoj/ /13, p. 10/.

La nekonformeco inter lingvonimo kaj etnonimo estas karakteriza en la scienca literaturo pri triboj de Afriko. Tiel, triboj danakil' kaj saho' /etnonimoj/ parolas en la lingvo de kuŝita grupo afar' /lingvonimo/ /6, p. 379/. La triboj beni-amer' uzas la lingvon tigre', rilatanta genetike al la norda grupo de semitaj lingvoj en Etiopio /6, p. 229/.

2/ La registron de verkoj, el kiuj estas elĉerpitaj materialo lingvonimia pri diversaj lingvoj de la mondo, rigardu en la aldonita "Bibliografio".

En la eŭropa kaj amerika kontinentoj: Deutsch /lingvonimo/, sed Österreicher /etnonimo/, English, sed American ktp.

3.- Al unu lingvonimo konformiĝas du kaj pli etnonimoj. La simila konformeco aperas en tiu okazo, kiam du popoloj uzas du variantojn de ĉiam sama lingvo, ekz.: srpskohrvatski jezik /serbokroata lingvo/ - Srbi i Hrvati /serboj kaj kroatoj/, kabardino-čerkesskij jazyk - kabardincy i čerkezy k.a.

La nomita situacio estas karakteriza por multnaciaj ŝtatoj, kie estas ofta fenomeno de bilingvismo kaj multilingvismo. Ekz. en Dagestano plej disvastigitan lingvon - avaran /lingvonimo/ uzas malmultnombraj popoloj - ĥvarŝinoj, andijoj, godoberinoj k.a. /etnonimoj/.

4.- Estas observata ankaŭ inversa konformeco: unu etnonimo - du aŭ pli lingvonimoj. La dirita estas karaktera por unu popolo, kiu uzas du egalrajtajn normojn de la sama lingvo: norvegoj havas riksmål kaj landsmål /nun - nynorsk/. La konformeco evoluiĝas inter la popoloj, kiuj parolas en 2-3 kaj pli da lingvoj. La lastaj esploroj en sociolingvistiko montras, ke la konformeco "unu etnonimo - kelkaj lingvonimoj" havas progresivan tendencon, ĉar "la homara socio iom post iom evoluiĝas de multlingveco al la redukto de nombro de lingvoj ĝis minimumo" /12, p. 303/.

5.- La ekzisto de lingvonimo ne postulas devige havi etnonimon. En tiu rilato ni havas belegajn ekzemplojn - ekzistado kaj uzado de internaciaj artefaritaj lingvoj, en kiuj ĝiaj adeptoj el diversaj landoj de la mondo parolas kaj skribas: Esperanto, Ido, Occidental /Interlingue/, Interlingua, Neo, en pasinteco - Volapük k.a. La analogia konformeco karakterizas ankaŭ iujn hibridajn /kreolajn/ lingvojn, per kiuj komunikiĝas diversaj popoloj.

6.- La ŝanĝo de etnonimo postulas ŝanĝon de lingvonimo. Tiel, kolonianoj de la Suda Afriko, alvenintaj en XVI jc. el Nederlando /Hollando/ kaj el Francio sin nomigis "buroj" /el neder. boer "kamparano"/. Ĝis la XX jc. estis disvastigita uzado de la etnonimo "buroj" kaj de lingvonimo "bura lingvo". Sed en lastaj dekjaroj buroj ekkomencis sin nomigi "afrikanderoj" kaj sian lingvon - "af-

rikaans" /6, p. 541/. Tiamaniere, estas evidenta proceso: buro→afrikandero /etnonimoj/, bura lingvo→afrikaans' /lingvonimoj/.

La amplekso de nocio "lingvonimo"

Kiel estis frue dirite, la nocio "lingvonimo" envicigas nomon de unu konkreta lingvo. Sed ni devas konstati, ke amplekso de la lingvonimo estas pli larĝa. Ja krom lingvoj, ekzistas ankaŭ lingvaj variaĵoj, efektivigantaj la saman funkcion de la komunikado /vere, eblecoj de la lastaj estas pli limigitaj/. Plimulte la lingvaj variaĵoj havas proprajn nomojn, kio motivigas analizi ilin kiel lingvonimoj. Pro tio en la nocio "lingvonimo" ni envicigu: 1/ dialektojn, 2/ ĵargonojn kaj slangojn, 3/ hibridajn /miksajn/ lingvojn, 4/ lokajn variaĵojn de la konataj literaturaj lingvoj.

1.- Dialektaj variaĵoj de la franca lingvo havas siajn nomojn: langue d'oui kaj langue d'oc /langue occitan/. Ofte al unu dialekto koincidas unu tribo. Tiel, sur la nuntempa turkmena lingva areo estas disvastigitaj kelkaj dialektoj, kiuj uzas iuj grupoj de la turkmena popolo: jomut dialekti /lingvonimo/ - jomutlar /etnonimo/, teke dialekti - tekeler ktp.

2.- Ĵargonoj, slangoj kaj sekretaj /konvenciaj/ lingvoj koekzistadas kun la ĉefa lingvo; ili ankaŭ formiĝas sur ĝia bazo. Ekz. inter mezaziaj ciganoj, por kiuj la patrina lingvo estas samarkanda dialekto de la taĝika lingvo, iam estis uzata specifika sekreta lingvo sub nomo "lavzi mugat" /variantoj: arabĩ, arabĉa/. Ankaŭ pasintece la derviŝoj kaj vagabondaj muzikistoj uzis konvencian ĵargonon "abdol tili" /8, p. 597/.

3.- La hibridaj /miksaj, miksitaj/ lingvoj formiĝadis plej multe sur la bazo de unu eŭropa lingvo kaj de lokaj dialektoj. En tiu okazo unu lingvonimo estas kontraŭmetita /kontraŭstarigita/ al kelkaj etnonimoj. Tiel, en la periodo de la belga koloniado de Kongo formiĝis sur bazo de la loka lingvo kikongo kaj franca lingvo unu nova hibrida lingvo "kileta". La lingvonimo "kileta" devenas de la kikonga prefikso ki- kaj el la franca vorto "l'état" /6, p. 487/. Jen kelkaj aliaj ekzemploj: Nigre Tongo /kun siaj variantoj - Taki-Taki, Creólized English/ kaj Jew-Tongo en Surinam'. Bone konataj en la lingvistiko estas: Papiamento, Pidgin English, Beach-la-mar, Chinook Jargon, la créole haitien, American Spanish Argot, Caribbean Creole k.a.

4.- Fine, por lingvonimia studado estas gravaj ankaŭ lokaj variaĵoj de la konataj literaturaj lingvoj, ekz.: American English, Canadian French, Americanized Italian, New Mexican Spanish k.a. Ankaŭ teritorie malpli disvastigitaj: Colorado Spanish, Pennsylvania German ktp. Plejparte la nomitaj lingvonimoj estas uzataj en la scienca literaturo.

La strukturo de lingvonimoj

En la lingvoj de la mondo lingvonimoj havas siajn specifikajn trajtojn. Ekzistas lingvoj, en kiuj lingvonimo signifiĝas per unu vorto /leksemo/, en aliaj - per vortokombinoj.

1.- La lingvoj kun duelementa strukturo de lingvonimo estas tre disvastigitaj. En tiuj lingvoj lingvonimo konsistas el obligatora komponento /elemento/ "lingvo" kaj el atributo, kiu diferencigas unu lingvonimon de alia. La diferenciga elemento en tiuj lingvoj uziĝas kun specifikaj sufiksoj. En la rusa: russkij jazyk /kie "russkij" estas diferenciga komponento, "jazyk" - obligatora komponento "lingvo"/, indonezijskij jazyk, ispanskij jazyk ktp. /Por stilistikaj celoj - plejparte en la arta literaturo - oni povas uzi lingvonimon sen obligatora komponento "lingvo" /jazyk/, ekz.: "Ja russkij by vyučil tol'ko za to, čto im razgovarival Lenin" /V. Majakovskij/. La fakto estas simila ankaŭ en iuj aliaj lingvoj/.

Ankoraŭ ekzemploj. En la turka kaj en la turkmena /kaj en aliaj lingvoj de la turka grupo/: türk dili, türkmen dili, rus dili, arap dili; sed estas eblaj ankaŭ lingvonimoj de la tipo: türkĉe, türkmenĉe, rusĉa, arapĉa. En la ĉina lingvonimio: hanj juj /la ĉina lingvo/, in juj /la angla lingvo/.

2.- Al la lingvoj kun duelementa lingvonimia strukturo estas kontraŭmetitaj lingvoj kun unuelementa nomo de lingvo. Precipe tia tipo karakterizas bantu'ajn lingvojn, en kiuj ekzistas specifaj klasoj de substantivoj-lingvonimoj. La nomitaj klasoj formiĝas per specifa karaktera indiko - klasa prefikso. En la lingvo Kiswahili kaj en iuj aliaj bantu'aj lingvoj de la orienta grupo la indiko de lingvonimia klaso estas prefikso ki- : Kiswahili, Kingwana, Kiunguja /dialekto de Kiswahili/. La grupo de bantu'aj lingvoj en Kongo ankaŭ havas lingvonimian indikon ki- , al kiu estas kontraŭmetita klaso de substantivoj-etnonimoj kun la indiko-prefikso ba- : kikongo /kongo'a lingvo/ - bakongo /kongoano/, kiluba - baluba, kikuba - bakuba k.a.

3.- Inter la lingvoj kun unuelementa kaj duelementa strukturo de lingvonimo lokiĝas lingvoj, en kiuj lingvonimoj plejparte havas simplan strukturon /kun specifa sufikso/, sed ankaŭ /por la stilistikaj celoj/ uziĝas lingvonimo duelementa. Ekz. en la ĉeĥa: indoneština - indonezský jazyk, ruština - ruský jazyk, srbocharvátština - srbocharvátský jazyk k.a.; en la slovena: slovenščina - slovenski jezik, italijanščina - italijanski jezik; en la germana: Persisch - die persische Sprache, Turkmenisch - die turkmenische Sprache, Chinesisch - die chinesische Sprache k.a.

La lingvonimiaj variantoj

estas propraj por la scienca literaturo. La apero de variantoj devenas el diversaj kaŭzoj, ekz. malsufiĉa esploreco de lingvo. Tiel, pro tre kompleta gramatika strukturo de lingvo, en kiu parolas unu tribo sub nomo "fulbe" en la Okcidenta Afriko /okcidenta bantoida, aŭ atlantika, grupo/, aperis ĝis 10 nomoj de la sama lingvo kaj ĝia popolo: ful, fulbe, pul, pulo, pel, filani k.a. Lastatempe estis akceptita en afrikanistiko por la popolo etnonimo "fulbe" kaj lingvonimo "fulfulde" /6, p. 104 k.a./.

Por unu lingvo en Etiopio afrikanistoj uzas du lingvonimoj - variantoj: tigrai /tigraj/ kaj tigrinja /tigriña/. La lasta /tigrinja/ genetike estas amhara termino kaj nun ĝi estas sinonimo de la tribo kaj de ĝia lingvonimo "tigrai" /5, p. 77, 137/.

En la rusa lingvonimio okazas proceso de la anstataŭigo aŭ renovigo de iuj lingvonimoj, ekz.: osmanskij jazyk → tureckij jazyk /la osmana lingvo - la turka lingvo/, annamskij jazyk → vjetnamskij jazyk; lastatempe ankaŭ: gollandskij jazyk → niderlandskij jazyk. En la franca lingvonimio: langue annamite → langue vietnamien, langue vogoule → langue mansi k.a. Pasintece estis disvastigita en la germana afrikanistiko fonetika varianto de lingvonimo "Suaheli"; nun pli kaj pli uziĝas alproksimita al la originalo lingvonimo /Ki/Swahili. Ekzistas ankaŭ aliaj fonetikaj variantoj en la lingvonimio, ekz. en la rusa: jazyk industani - jazyk hindustani /unua lingvonimia fonetika varianto, jam oni ne uzas ĝin/, singalezskij jazyk - singal'skij jazyk.

En la okazoj, kiam unu komponento de kompleta lingvonimo estas tradukita, sed alian oni sen ŝanĝo uzas, ankaŭ aperas variantoj, ekz. en la germana: Weissrussisch - Belorussisch. En la rusa kaj en alia eŭropa lingvonimio la varianteco okazas ankaŭ rezulte de tio, ke nomojn de lingvoj el la lingvonimia klaso de bantu'aj lingvoj oni uzas jen kun prefiksa lingvonimia indiko, jen sen ĝi, ekz.: lu- ganda /lingvonimo kun prefiksa indiko/ - ganda /lingvonimo sen prefiksa indiko/, ki-kongo - kongo, ki-ngwana - ngwana, se-sutho - sutho /sotho/ ktp.

La origino kaj la fontoj de lingvonimoj

1.- Plimulte bazo por la formiĝo de lingvonimo estas etnonimo. Ekz. en la rusa: tamil /tamilo, -ano/ - tamil'skij jazyk /la tamila lingvo/, arab - arabskij jazyk k.a.

2.- La specifiko de akustika /sona/ parolado povas esti motivo por apero de lingvonimo kaj de etnonimo. Tiel, unuaj holandaj /nederlandaj/ enmigrantoj /XVIII jc./ en la Suda Afriko pro karakteraj klakantaj sonoj, kiuj estas specifaj por la hotentotaj lingvoj, nomigis la tribojn per etnonimo "hottentüt" /kio signifas en la nederlanda "balbutulo" / kaj poste per tiu vorto ankaŭ ilian lingvon.

3.- Bazo por la lingvonimo povas esti la nomo de loko. Ekz. lingvonimo "munĝana lingvo" /unu el iranaj lingvoj, en kiu parolas nun ĉirkaŭ 2500 homoj/ estas kaŭzita de la nomo de loko Munĝan /sudorienta parto de la afgana Badahŝan/. La mezepokan persan lingvon oni nomis per lingvonimo "pahlavi"/pli vere - pahlavik/, kiu baziĝas sur la toponimo "Pahlav" /t.e. "Parthia", "Parfia"/. /8, p. 141/.

4.- La lingvonimojn oni povas pruntepreni el alia lingvo. Tiel, lingvonimo "mal'gaŝskij jazyk" venis en la rusan el la franca lingvo/langue malgache/, sed lastatempe pli ofte oni uzas pli proksiman al la originalo lingvonimon "malagasijskij jazyk".

La sciencaj /ĝeneraligaj/ lingvonimoj

En la scienca literaturo estas vaste disvastigita unu grupo de nomoj-terminoj, kiun ni nomu lingvonimoj- ĝeneraligoj, aŭ sciencaj lingvonimoj. Genealogia klasifo de lingvoj de la mondo, baziĝanta sur la principo de la lingva parenceco, apartigas lingvajn familiojn, grupojn kaj subgrupojn. En la lingvistiko por ili oni uzas specifajn nomojn. Tiel, en la rusa: slavjanskije jazyki /slavaj lingvoj/, semitskije jazyki k.a. Kun evoluo de la lingvistika scienco, lingvonimia grupo ankaŭ evoluiĝas. Ekz., en la rusa /kaj ankaŭ en aliaj eŭropaj/

lingvonimio grupon de turkaj lingvoj pasintece oni nomis "tureckije jazyki", poste - "turecko- tatarskije jazyki" kaj nuntempe - "tjurkskije jazyki". Pasintece la lingvojn de Afriko sude de Saharo oni nomis "negrskije jazyki". Sed posta studado kaj esplorado de afrikaj lingvoj rezultiĝis en la fakto, ke afrikanistoj apartigis el "negraj lingvoj" diversajn lingvogrupojn - "jazyki bantu", "kuŝitskije jazyki" k.a.

Konkludante, ni devas substreki, ke en nia artikolo estis tuŝitaj nur kelkaj problemoj de la lingvonimiko. Niaopinie, estas tre grave el la teoria kaj el la praktika vidpunktoj detale analizi lingvonimian materialon ekz.en unu aparta lingvo, aŭ observi realigon de unu lingvonimo en diversaj lingvoj de la mondo. La novapartigita aspekto de onomastiko - la lingvonimiko - havas ankaŭ praktikajn problemojn, rilatantajn al la ĝustigado kaj al la unifikado de lingvonimoj sur bazo de la internacieco kaj de ligoj kun lingvo-originalo.

Bibliografio

1. Drezen E. Historio de la mondolingvo, Oosaka, Pirato, 1967.
2. Meillet A. et Cohen M. Les langues du monde. Nouvelle édition. T.I-II, Paris, 1952.
3. Weinreich U. Language in Contact, The Haague, Mouton & Co, 1967.
4. Simeon R. Enciklopedijski rječnik lingvističkih naziva /na 8 jezika: hrvatsko-srpski, latinski, ruski, njemački, engleski, francuski, talijanski, španjolski/. T. I-II, Zagreb, Matica Hrvatska, 1969.
5. Africana I. /Trudy gruppy afrikanskih jazykov/, Moskva-Leningrad, Izd. AN SSSR, 1937.
6. Narody Afriki. /Narody mira. Etnografičeskije očerki/, Moskva, Izd.AN SSSR, 1954.
7. Narody Zarubežnoj Evropy. T.I, Moskva, Izd. AN SSSR, 1964; T. II, Moskva, Nauka, 1965.
8. Narody Srednej Azii i Kazaĥstana. T. I, Moskva, Izd. AN SSSR, 1962; T. II, Moskva, AN SSSR, 1963.
9. Jazyki narodov SSSR. Moskva, Nauka.
   T.I /Indoevropejskije jazyki/, 1966.
   T.II /Tjurkskije jazyki/, 1966.
   T.III /Finnougorskije jazyki/, 1966.
   T.IV /Kavkaskije jazyki/, 1967.
   T.V /Mongol'skije jazyki, tunguso-manĉĝurskije jazyki/, 1968.
10. Juŝmanov N.V. Opredelitel' jazykov, Moskva-Leningrad, 1941.
11. Giljarevskij R.S., Grivnin V.S. Opredelitel' jazykov mira po pis'mennostjam, izd. 3. Moskva, Nauka, 1965.
12. Andreev M.S. Po etnologii Afganistana, Taŝkent, 1927.
13. Deŝeriev Ju. D., Protĉenko I.F. Razvitije jazykov narodov SSSR v sovetskuju epohu, Moskva, Prosveŝĉenije, 1968.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.

SEMANTIKO

/V.Zlotnikova, PARIZO, Francio/

La vorto "semantiko", devenanta el la greka "semantikos", kio signifas "signifas", kovras per si du nociojn: 1/ laŭsignifa aspekto de aparta vorto kaj 2/ scienco pri vortsignifo, alie nomata ankaŭ semasiologio /=scienco pri signifo, senco/. Kiel scienco la semantiko formiĝis fine de la lasta jarcento. Ĝi estis konsiderata kiel branĉo de lingvoscienco okupiĝanta pri la signifoj de la vortoj kaj pri ilia historia evoluo.

Proksimume samtempe, en la sino de la logiko, naskiĝadis alia aparta scienco, iom poste ricevinta nomon semiotiko - scienco pri signoj. La impeta progreso de la scienco en nia epoko kondukas al tio, ke ekestas novaj specoj de sciencoj, la malnovaj reciproke sin interpenetras, tute aliformigante apartajn branĉojn de iu scienco. Tio okazis ankaŭ al la semantiko. La brila progreso de la matematikaj sciencoj kaj la penetro de matematiko en sciencojn, kiuj iam estis konsiderataj nematematikeblaj, kaŭzis modifon en pluraj tradiciaj humanitaraj sciencoj. Nun oni ne hezitas apliki en tiaj sciencoj metodojn de sciencoj naturaj. Ekzemple, la principo de kromeco de Bohr estas aplikebla ankaŭ en la lingvistiko.

La semiotiko - scienco pri signoj kaj ties sistemoj - fortiĝis sur bazo de la matematika logiko kaj ĉiam pli vastigis sian kampon de esplorado. La unuajn provojn konsideri la lingvon kiel sistemon de signoj ni trovas ĉe filozofoj.